

# KONGRESA ≡ ≡≡≡ BULTENO

Valencia majo 1923

---

## PROGRAMO

DE LA

### UNUA KONGRESO DE IBERIAJ ESPERANTISTOJ

---

Okazonta en Valencio, sub Honora Prezidanteco de lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII<sup>a</sup>, de la 17<sup>a</sup> ĝis la 20<sup>a</sup> de Majo 1923<sup>a</sup>.

#### Tago 17<sup>a</sup>

Je la deka matene, akcepto de la kongresanoj en la Grupo Esperantista Valencio, strato Mar, 23, por interkonsento pri la tagordo kaj kongresstraro.

Je la kvara horo posttagmeze, solena malferma kunsido de la Kongreso alestota korporacie de la Urbeŝtraro, kiu ĝentile cedis la Urban Muzikistaron. Okazos la kunsido en la Paraninfo de la Universitato, kun ĉeesto de la Aŭtoritatoj. Eldiros malferman paroladon S-ro. Profesoro Won Kenn, reprezentanto de kelkaj ĉinaj korporacioj.

#### Tago 18<sup>a</sup>

Matene, je la deka horo, unua laborkunsido de la Kongreso en la Scienca Ateneo; kaj posttagmeze, je la sesa, la Urbeŝtraro oficiale regalos la kongresanojn per lunĉo, kiu okazos en la Urba Palaco de la Ekspozicio.

#### Tago 19<sup>a</sup>

Dua laborkunsido de la Kongreso de la sama horo. Se ĝi ne povos fini la laboron, oni daŭrigos posttagmeze.

#### Tago 20<sup>a</sup>

La dekan matene solena katolika Diservo en la Preĝejo de Piaj Lernejoj, kun esperanta parolado de Moŝta Pastro Mojado, el Madrido. Sinsekve en la festa salono de Andrea Kolegio, oni malkovros la marmoran ŝtonon kiun la Grupo Esperantista Valencio dediĉas al Piaj Lernejoj, kiel memoraĵon al la nesto de Esperanto en Valencio.

---

Intertempe kaj laŭeble oni vizitos muzeojn, valenciajn vidindaĵojn kaj festojn.



MAYORDOMÍA MAYOR

DE  
S. M.

Su Majestad el Rey (q. D. g.) se ha servido aceptar con gran complacencia, la Presidencia Honoraria del Primer Congreso de Esperantistas Ibéricos que ha de tener lugar en esa Capital del 17 al 20 del próximo Mayo, cuyo honorífico cargo han tenido la amabilidad de ofrecer al Augusto Señor.

De Real orden lo participo a V. para su conocimiento y efectos correspondientes.

Dios guarde a V. muchos años.

Palacio 30 de Abril de 1923.

El Jefe Superior de Palacio

*U. Campuzos de la Torre*

---

Sr. D. Luis Jordana de Pozas.  
Presidente de la Comisión Organizadora del  
Primer Congreso de Esperantistas Ibéricos.

VALENCIA

## Ĉe la krónigo de la Virgulino de la Senhelpitoj

Kvankam mi kantis ofte Viajn glorojn,  
 Vian helpadon, Viajn mirindaĵojn,  
 Vian potencon, amon, kaj honorojn,  
 Mi ne silentos nunajn solenaĵojn.

De la apero al Zebedeido,  
 Gis nunkronigo antaŭ oraltaro,  
 Oni laŭdegis Vin kun la Safido  
 En la ĉielo, tero, kaj sur maro.

Dum la jarcentoj falis l'imperioj,  
 Ĉiujn popolojn elrenversis homo,  
 Ĉiujn leĝarojn ŝanĝis la nacioj,  
 Nur unu aĵo staris, Via Nomo.

Ĉu oni aŭdis, ke la senhelpiton,  
 Kiu alkuris ĉe la Via trono,  
 Vi ne aŭskultis? Aŭ la forlasiton  
 Vi ne akceptis sub la Via krono?

Niajn heroojn en la fama kavo  
 Kiu protektis? Niajn fulmlegiojn  
 Kiu kondukis por patruja savo?  
 Via stelaro sendis lumradiojn.

Kien ni iros, kaj ni Vin ne trovos?  
 Tutan terrondon certe Vi plenigas;  
 Por Dion ami, nian koron movos,  
 Dum la anĝelojn plene feliĉigas.

Ĉu oriente, kie mateniĝas,  
 Ĉu okcidente, kie sun' subiras,  
 Sude, kaj norde, ĉie Vi troviĝas,  
 La ŝpiranton Vi antaŭeniras.

Al la pentristoj estas Vi belaĵo,  
 Al la poetoj lum' neestingebla,  
 Al la saĝuloj glora realaĵo,  
 Al Vin amantoj ĝu' neelĉerpebla.

Ĉiu estaĵo bele Vin ornamas,  
 Suno, stelaro, luno kaj la floroj,  
 La senhelpitoj Vin tutkore amas,  
 Birdoj kantadas, kaj l' anĝelaj ĥoroj.

Viroj, junuloj kaj la plej aĝuloj,  
 Ĵuras virege antaŭ Via gloro  
 Vian honoron kontraŭ nekreduloj  
 Ĉiam defendi ĝis la lasta horo.

Kiam l' infero kaj la inferidoj  
 Tondre blekegos kontraŭ Via nomo,  
 Bruston prezentos ĉiuj niaj idoj,  
 Vin parfumante per fervoraromo.

Aŭdu glorega Difilnaskintino  
 Preĝon humilan de surternaskitoj,  
 Ni Vin alvokos ĉiam La Patrino,  
 La Virgulino de la Senhelpitoj.

PASTRO MARIANO MOJADO.

## PROPONOJ RICEVITAJ

### Propono pri esperanta organizajo

Proponas al I.<sup>a</sup> Kongreso Esperantanoj de Iberiaj Landoj en Valencio.

1.<sup>o</sup> Definitive starigi Unuiĝon Tutlandan de Esperantanoj sub nomo «*Konfederacio de Iberaj Esperantanoj*», konsistantan el nunaj Federacioj kaj starigotaj pro disiĝo de la Federacio «Zamenhof», kiam, pro progreso de Esperanto en regiono aŭ regionoj al ĉi-tiu apartenantaj, la regiono aŭ regionoj progresintaj volu starigi sin aŭtonome.

2.<sup>o</sup> Por tion firme starigi, kaj por tute frata *kunlaborado* efika por-priper *Esperanto*, nepre necese estas ke en ĉiu Federacio nur oni celos pure Esperanton, ĝian triumfon, tute fidele al la *fundamento*, kun disciplino firma al Lingvaj Institucioj niaj, flankenlasante ĉiam ajn politikan, religian, socialan aŭ alian celon kiu apartiĝas de la celo pure *Esperanta*. Tamen ĉia kredo povos sendepende starigi Unuiĝon de Samideanoj Regionan aŭ Tutlandan, eĉ Internacian, por praktike utiligi Esperanton al sia celo sed tutplene ekster Federacioj kaj Konfederacio.

3.<sup>o</sup> En ĉiu regiono la Federacio entenos ĉiujn Asociojn pure Esperantajn, por kio se en iu estas iam malkonsento aŭ disiĝo, tio devas malaperi per cedo memvola, reciproka kaj fratiga, kiel starigis la Majstro, ne kiel altrudo de unu sur alian, aŭ submetiĝo de malplimulto al plimulto, ĉar sub la senmakula verda flago ni, ĉiuj, estas duoble, se estus ebla tia duobleco, fratoj egalrajtaj, forgesante kaŭzojn de malpaco.

4.<sup>o</sup> Se membro de iu Federacio translokiĝus al loko de alia Federacio,

je la fino de la jaro, devos aliĝi al la regiona de sia nova loĝejo; sed dum alvenos la dato, oni lin akceptos frate kiel samfederacianon, ĉar ĉiu Esperantano nur povas esti membro aktiva de unu sola Federacio, kvankam honore li povos esti membro eĉ de ĉiuj kaj ĉu pagi, ĉu ne, difinitan kotizaĵon, eĉ pli altan.

5.<sup>e</sup> Irante de la simplaĵo al la komplikajo, por plej potenca forto tutmonda, ni, la Konfederacioj, nin uniuĝu internacie sub la aŭspicoj de la fruktodona kaj triumfanta Universala Esperanto Asocio, por kio ni proponu al tiu ĉi plej efika institucio la manieron, kiun certe ĝi akceptos, laŭ esprimas jenan punkton.

6.<sup>e</sup> Tial ke la laboro postulas elspezojn, ke la Esperantanoj ne nur devas atenti pri la laboro enlanda, sed ankaŭ pri la ĝenerala de U E A kaj Oficialaj Institucioj, kiujstarigis en Helsinko, pasintan jaron, nian Tutmondan Unuiĝon, por ke ĉi tiu estu reala; kaj konsiderante ke nuntempe la Esperantanoj ĝenerale estas malriĉaj, ni starigu ĉiujaran ĝeneralan kotizaĵon konsistantan el: 2'50 pesetojn por U E A; 0'50 por Oficialaj Institucioj; 1 peseton por la

Konfederacio; 1 peseton por la Federacio, en tute kvin pesetojn. U E A akceptos las 2'50 ptojn. kiel kotizaĵon nur por la Konfederacioj, kiuj ankoraŭ ne estas *neanoj*, ĉar ni, la antikvaj membroj restos pagante la malnovan kotizaĵon; sed U E A liveros la karneton, eĉ ĝi povos esti speciala, de membro al novaj aliĝintoj, kaj po 1'50 pesetojn la Jarlibron al ĉiu membro. Tamen oni povas pagi laŭ memvolo pli altajn kotizaĵojn.

7.<sup>e</sup> La Konfederacio okazigos Kongreson ĉiujare en malsama regiono,



PROFESORO WON KENN

S-ro. Won Kenn. nia hodiaŭa gasto, tre konata de la esperantistaro, ĉar ĉeestis la Internacian edukistan konferencon ĉe la Ligo de Nacioj (1922) kaj la Internacian Komercon Konferencon en Venezia dum tiu-ĉi jaro, Konsentis veni en Valencion por partopreni la Unuan Kongreson de Iberiaj Esperantistoj kaj fari paroladon en ĝia malferma solena kunsido.

kaj se en la difinita regiono okazus Federacia Kongreso, oni profitos okazigi samtempe ambaŭ en la sama loko por plej granda sukceso.

8.<sup>e</sup> La Komitato reganta la Konfederacion konsistos: el la Prezidantoj, federaciaj el kiuj estos Prezidanto konfederacia tiu de la Federacio en kiu okazis la lasta Kongreso Konfederacia; el Kasisto, elektita de la Komitatoj el ili mem; el Sekretario kaj Vicsekretario de la Federacio kiun estru la Prezidanto konfederacia kaj loĝu apud li. Konsilantaron formos la gravaj Esperantanoj de la tuta lando, sed Konsilantoj, Sekretario kaj Vicsekretario ne rajtas voĉdoni; tamen la Komitato konfederacia rajtas meti aferon al voĉdonado de la Konsilantaro, kiu havos nur kvin konsilantojn po Federacio kaj kiujn elektos iliaj propraj samfederacianoj. Dum Kongreso oni rajtigos la novan komitaton kaj oni transdonos la postenojn kaj elektos la kongresurbon por la sekvanta.

9.<sup>e</sup> La Komitato konfederacia estas ligilo inter la Federacioj kaj la Unuiĝo fondita en Helsinki, kaj kvankam Federacioj en la regionoj funkcias aŭtonome, tial ke ni celas akceli alprenon de Esperanto je la Ŝtatoj kaj je la publiko, Konfederacia Komitato povas alvoki al iniciativoj tiacele ĉu enlanden ĉu eksterlanden laŭ konveno eĉ postuloj de pli-malpli ĝenerala movado.

10.<sup>e</sup> Konstati nepran neceson subteni enlandajn gazetojn, kaj rekomendi al Konfederacianoj la abonon.

Dar-Quebdani (Maroko) 27<sup>an</sup> Marto 1923.—*Julio Mangada.*

#### (Propono pri scienca Kongreso en Salamanca)

Al la Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj en Valencio.

Konsiderante ke je l'fino de l'proksima junio okazos, en Salamanca, grava «Kongreso pri Sciencoj», prezidota de Ŝtatestroj kaj ĉeestota interalie, de reprezentantoj de ĉiuj portugala kaj hispana Universitatoj, Sciencaj Akademioj, k. c.

Konsiderante ke estas jam anoncitaj, por tiu Kongreso, sciencaj paroladoj en portugala kaj hispana lingvoj, ne memkompreneblaj inter si reciproke de la alinaciaj partoj de l'kongresanaro.


Konsiderante tiun Kongreson kiel taŭgan agadkampon por propagandi *Esperanto'n* en Universitatajn rondojn.

La subskribanto, Roberto Maraury Barredo, hispana Konsulo de Internacia Scienca Asocio (Salamanca, Paseo Villarroel, 19), havas la honoron proponi al *Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj*:

Unue: Ke ĝi difinu komitaton por verki tuj, sciencstilan hispanlingvan raporton pri taŭgeco de Esperanto por faciligi internaciajn rilatojn inter sciencistoj; kaj

Due: Ke tia raporto estu sendota oficiale je l' nomo de l' Esperantista Kongreso—kaj se eble, per Valencia Universitato—en la Kongreson pri Sciencoj, de Salamanca. Kaj ke oni zorgu por ke oni enprogramigu ĝin inter legotaĵoj, dum kongresaj publikaj kunsidoj.

Respektplene salutas la Kongreson de la Iberiaj Esperantistoj.  
Salamanca la 28<sup>an</sup> de marto de 1923.—*Roberto Maraury*.



ORGANIZA COMITATO DE LA KONGRESO

De maldekstre al dekstre S-roj Millás, Jordana de Pozas, Piñó, Máñez, kaj Caplliure.

### (Propono pri hispana esperanta vortaro)

Konsiderante, ke hispanlingva esperantistaro kaj kursanaro nepre bezonas kompletan kaj modernan hispan-esperantan vortaron ne eldonitan ĝis nun.

Konsiderante dezirinde ke tia vortaro estu baldaŭe verkota kun plej alta garantio de kompetenteco.

Konsiderante ke tiu kondiĉo estus plej trafe plenumota se oni starigus «Komisionon por la vortaro», partoprenota de la hispanaj Lingvo-komitatoj kaj eminentuloj de nia movado.

Konsiderante ke nur tia konsilantaro povus aŭtoritate traduki esperan-



ten la ĝis nun ne tradukitajn hispanajn vortojn (ekzemple vorto «caber»); solvi dubojn; kaj elekti inter individuaj proponoj; tiamaniere verkanta plej rekomendindan hispan-esperantan vortaron.

Konsiderante necese aldoni al ĝi Sekretarion kies ĉefan taskon konsistis enlistigi la tradukotajn (tradukindajn?) vortojn; dissendi tiujn listojn al komitatanoj por ke ĉiu el ili proponu solvojn laŭ sia opinio; kolekti ĉies respondojn prezentotajn de li al Prezidonto kaj protokoligi decidojn.

Konsiderante ĉies monhelpon necesa por eldoni la esperinde meritplenan frukton de tia kunlaborado.

La subskribanto, Roberto Maraury Barredo (Salamanca, Paseo Villarroel, 19), havas la honoron proponi al *Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj*:

Une: Ke ĝi starigu tian komitaton; difinu siajn Prezidonton, membrojn kaj Sekretarion; kaj deklaru siajn industriajn rajtojn rilate al eldona entrepreno. Kaj

Due: Ke ĝi alvoku al hispanlingva samideanaro kun celo havigi monajn rimedojn por formi ĉu akcian, ĉu kooperativan societeton por pagi poŝtajn elspezojn de l'komitato kaj eldoni la verkotan vortaron.

Kun respektplena saluto al la Kongreso!

Salamanca, la 28<sup>an</sup> de marto de 1923.—*Roberto Maraury*.

**: Propono de la Organiza komitato :  
de Iberia Esperantista Konfederacio**

Al la Unua Kongreso de Iberiaj Esperantistoj.

Plenumante la taskon ricevitajn de «Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj» ĉitium Komitato redaktis la apudan projekton de Regularo por nia dezirata Konfederacio.

Kompreneble tiu projekto ne naskiĝis kiel Minervo, sed ĝi estas legitima filo de la propono de la Federacio Kataluna prezentita al *Dudkeilo*. Nur ne multaj punktoj estas ŝanĝitaj aŭ aldonitaj de ni al ĝi.

La Kongreso sin priokupos pri tiu projekto, ĝin studos, kaj ĝiaj decidoj estos la plej altvaloraj por la iberia esperantistaro.

Zaragoza la 1<sup>an</sup> de majo de 1923<sup>a</sup>.—La Prezidanto, *Manuel Maynar Barnolàs*.—La Sekretario, *E. Gaston*.

I

«Iberia Esperantista Konfederacio» celas starigi oficialigon de Esperanto en Iberio.



## II

Estas membroj de I. E. K. nur la regionaj esperantistaj federacioj.

La esperantistoj povas aliĝi al I. E. K. aliĝante al Federacio de sia Regiono.

La esperantistoj de Regiono, kiu ankoraŭ ne havas specialan Federacion, povas, aliĝante al Zamenhofa Federacio, aliĝi al I. E. K.

## III

**La Federacioj povas esti:**

*La Basca Federacio:* Kun la provincoj Vizcaya, Guipúzcoa, Alava kaj Pamplona.

*La Aragona Federacio:* formita el la provincoj Zaragoza, Huesca kaj Teruel.

*La Kastila Federacio:* formita el la provincoj el ambaŭ Kastiloj (Nova kaj Malnova).

*La Galicia Federacio:* kun la kvar Galiciaj Provincoj kaj ankaŭ tiu de Asturias.

*La Murcia Federacio:* Murcia kaj Albacete.

*La Andaluza Federacio:* Ĉiuj andaluzaj provincoj kaj eble la Kanariaj insuloj.

*La Valencia Federacio:* Valencia, Castellón de la Plana kaj Alicante.

*La Ekstremadura Federacio:* Cáceres kaj Badajoz.

*La Nord-Africa Federacio:* Melilla, Tetuán kaj Larache.

*La Kataluna Federacio:* Barcelona, Tarragona, Lérida kaj Gerona, kaj eble la Balearaj Insuloj.

*Portugalaj Federacioj:* Tiuj dependas de la formita aŭ formotaj enskribotaj laŭ iliaj deziroj.

## IV

La I. E. K. estos reprezentata de sia Komitato, kiu konsistos el la Prezidantoj de ĉiuj Federacioj kaj po du membroj, de ili nomitaj en la Konfederacia Kongreso.

La Kongreso decidos kiu federacia Prezidanto estos la Konfederacia Prezidanto, kaj kiu persono estos lia anstataŭanto.

La Komitato elektos, Sekretarion, Kasiston kaj iliajn okaze anstataŭontojn.

## V

La Konfederacia Komitato havas la taskon realigi la decidojn de la Konfederaciaj Kongresoj.

Por ĉiu ĝia decido oni petos la opinion de ĉiu komitatano per aparta komunikaĵo, kaj la plejmulto da egalaj respondoj ricevitaĵ dum dek tagoj, estos la decido, se ilia nombro estas supera al tiu de la ceteraj respondoj. Se oni ne atingus tiun rilatan nombrecon oni repetus la opinion nur pri la du pli multenombraj respondoj.

Kiam la Komitato prokrastos la realigon de iu kongresa decido pli ol unu monaton, ĉiu ajn komitatano povos levi la konfederacian flagon por kunvoki liajn kunkomitatojn, escepte se la prokrasto estus decidita almenaŭ de du trionoj de la komitatanoj.

La Komitato sidos en la sidejo de ĝia Prezidanto.

## VI

Ĉiu Federacio rajtas plenan liberecon en sia federacia lando. Ĝi povos organizi siajn Kongresojn, eldoni gazetojn, propagandilojn, k. c. laŭ sia bonplaĉo interne de siaj kampoj. La Komitato de I. E. K. agos rekomendante al la Federacioj ĉion kion ili devas zorgi aŭ fari, neniam sin trudante reciproke Konfederacio kaj Federacioj en nepropaj agadkampoj.

## VII

Ĉiu federacia presorgano estos devigata rezervi senpagan sufiĉan lokon por la fako «Oficialaj publikigoj de Iberia Esperantista Konfederacio».

## VIII

Ciujare devos okazi Kongreso en la teritorio de unu el la Federacioj, se eble en sama dato kaj loko kie okazos la Kongreso de tiu Federacio.

## IX

La Konfederacia Kongreso decidos la manieron kiel la Federacioj subtenos la Konfederacion.

## X

Esperanto estas la sola lingvo uzota de la Konfederacio en siaj internaj rilatoj. Por la ne esperantistoj povos esti uzata ĉiu lingvo, landa aŭ eksterlanda, laŭ la okazo logike konsilu, sed ĉiu-okaze, nur kun antaŭa kaj speciala permeso de la Prezidanto.

Zaragoza 1<sup>an</sup> de majo de 1923<sup>a</sup>.—La Prezidanto, *Manuel Maynar Barnolas*.—La Sekretario, *E. Gaston*.

# LISTO DE KONGRESANOJ ALIĜINTAJ

## Korporacie Aliĝis Oficiale

Urbestraro Valencia.  
 Urbestraro San Sebastián-a.  
 Urbestraro de Palma de Mallorca.  
 Specimena Foiro Valencia.  
 Centra Esperantista Madrida Grupo.  
 Barcelona Esperanta Societo.  
 Hispana Esperantisto (Jurnalo).  
 Zamenhofa Federacio.  
 Grupo Esperantista de Bilbao.  
 Sevilla Esperantista Grupo.  
 Grupo Esperantista Baracaldo.  
 Grupo Esperantista Liria (Valencia).  
 Grupo Esperantista Chiva (Valencia).  
 Esperanta Societo «Aplech».  
 Andalucia Esperantista Federacio.  
 Kataluna Esperantista Federacio.  
 Zaragoza Provinca Deputataro.  
 Esperanta societo «Frateco» el Zaragozo.  
 Cámara Oficial de Comercio, Industria y Navegación de Valencia.

## Individuaj Aliĝintoj

1. S-ro. Miguel de Elizaicin España, Generalo, Huerto San Luis, Alicante.
2. S-ro. Francisco Albiñana Marín, Profesoro, Instituto, Albacete.
3. » Luis Jordana de Pozas, Universitata Profesoro, Cirilo Amorós, 28, Valencia.
4. S-ro. Enrique de Benito, Universitata Profesoro, Grabador Esteve, 5, Valencia.
5. S-ro. Andrés Piñó Alegret, Advokato, Colón, 24, Valencia.
6. » Vicente Marzal Mustieles, Advokato, Caballeros, 27, Valencia.
7. » Manuel Millás Sagraeras, Advokato, Guillem de Castro, 151, 2.º, Valencia.
8. S-ro. Fernando Soler Valls, Telegrafisto, Boix, 3, 3.º, Valencia.

9. S-ro Manuel Caplliure Ballester, Makleristo, Tejedores, 5, 2.º, Valencia.
10. S-ro. Ricardo Albiol Aguilar, Kuracisto, Moratín, 5, 2.º, Valencia.
11. » José M.ª Marzal Pavía, Kuracisto, Sagunto, 40, bajo, Valencia.
12. » Antonio Montesinos Cabrelles, Komercisto, Unión, 11, 1.ª, Valencia.
13. S-ro. Narciso Escuin Valls, Stenografisto, San Vicente, 182, Valencia.
14. S-ro. Luis Pérez Requena, Makleristo, Murillo, 26, Valencia.
15. » Eleuterio Estellés Granell, Urbkonsilanto, Puñalería, 7, Valencia
16. » José Martínez Aloy, Advokato, Samaniego, 7, Valencia.
17. » José Ventura González, Profesor, Roter, 12, Valencia.
18. » José Feo Cremades, Advokato, Platerías, 8, Valencia.
19. » Eduardo Fornas, Bankoficisto, Orihuela, 4, 3.º, Valencia.
20. » Félix Bilbao, Kanoniko, Muñoz Degrain, 3, 2.º, Valencia.
21. » Manuel Salom Fornals, Fabrikisto, San Vicente, 292, Valencia.
22. » Miguel Botella Pérez, Librovendisto, San Vicente, 141, Valencia.
23. F-ino. Aurora Yanguas, Farmaciastudentino, Gran Vía Cervantes, Y, Valencia.
24. F-ino. Soledad Yanguas, Gran Vía Cervantes, Y, Valencia.
25. S-ro. Pastro José M.ª Zaragoza, Monaho, Iglesia de San Lorenzo, Valencia.
26. S-ro. Pastro Anselmo del Pilar, Monaho, Convento de Carmelitas, Valencia.
27. S-ro. Pastro Antonio Guinart, Monaho, Escuelas Pías, Castellón de la Plana.
28. S-ro. Vicente Alonso Sanz, Leütenantokolonelo, Sánchez Bustillo, 3 2.º, Madrid.
29. S-ro. José Perogordo Camacho, Leütenantokolonelo, Santos, 2, principal izquierda, Madrid.
30. S-ro. Eduardo Kuhl, Diplomato, Orfila, 5, Madrid.
31. » Ernesto Guilmain Serantes, Militisto, Rodón, 8 (Hotel Bellas Vistas), Madrid.
32. S-ro. Luis Rodríguez Escartín, Oficisto, Instrucción, 8, Madrid.
33. » Epitacio García Hernández, Bienulo, Conde Barajas, 4, 2.º izquierda, Madrid.
34. S-ro. Federico Burkard, Kuiristo, Palace Hotel, Madrid.
35. » Emilio Gastón Ugarte, Advokato, Jaime I, 68, 2.ª, Zaragoza.

36. S-ro Manuel Maynar Barnolas, Advokato, San Juan, 4, principal, Zaragoza.
37. F-ino. Sara Maynar Escanilla, Studentino, San Juan, 4, principal, Zaragoza.
38. S-ro. Fernando Gorgues Torredelfot, Komerca Profesoro, San Ger-vasio, 68, Barcelona.
39. S-ro. José Núñez Rey, Advokato, Muñoz Torrero, 7, 2.º, Madrid.
40. » Benigno de Luna Gómez, Štataadvokato, Dehesa de la Villa, Pirineos, 7, Madrid.
41. S-ro. Jerónimo Martos Conde, Policisto, Mesón de Paredes, 85, 2.º izquierda, Madrid.
42. S-ro. Ricardo Codorniu Stárico, Arbara Inĝeniero, Paseo del Malecón, C, Murcia.
43. S-ro. Julio Mangada Rosenorn, Majoro, Regimiento Galicia, núm. 19, Jaca (Huesca).
44. S-ro. José Serrat Parés, Komercisto, Aribau, 55, 2.º, 2.ª, Barcelona.
45. » José María Royo Villanova, Inĝeniero, Costa, 12, entresuelo, Zaragoza.
46. S-ino. Dolores Magdalena de Royo Villanova, Costa, 12, entresuelo Zaragoza.
47. S-ro. Juan Martos Ojeda, Tornisto Mehanikisto, Las Calderonas, 10, Villanueva de las Minas (Sevilla).
48. S-ro. Antonio Marmol Cordero, Oficisto, Villanueva de las Minas (Sevilla).
49. S-ro. Canuto Sánchez Solano, Kuracisto, Antonio Pérez, 1, Requena (Valencia).
50. S-ro. José María Blat Bort, Spertulo, Corset, 7, 1.º, Valencia.
51. » José Garzón Ruiz, Advokato, Muñoz Torrero, 10, San Fernando (Cádiz).
52. S-ro. Roberto Maraury, Doganinspektoro, Paseo Villarroel, 19, Salamanca.
53. S-ro. José Anglada, Komerca Komizo, Sitjas, 8, 3.º, 1.ª, Barcelona.
54. » Rafael Fiol Paredes, Milit-Kuracisto, Bizcocheros, 37, Jerez (Cádiz).
55. S-ro. Jaime Llosas Paloma, Komercisto, Quemada, 25, Tarrasa (Barcelona).
56. S-ro. Manuel Prat, Ledfabrikanto, Bañolas (Gerona).
57. » Emilio Carbonero Nadal, Pastro, Tapinería, 31, 2.º, Valencia.
58. » Daniel Lloréns Sastre, Kuracisto, Pedralva (Valencia).

59. F-ino. Gratiniana Verduch, Bienulino, Unión, 8, entresuelo, Valencia.
60. S-ro. Antonio Carbonell Bosque, Telegrafista, San Roque, Alcira (Valencia).
61. S-ro. Germán Olivares Ordiñana, Terkulturisto, Otos (Valencia).
62. » Gaudencio Vázquez Sánchez, Industriisto, Jaime Vera, 26, Nerva (Huelva).
63. S-ro. Luis Campos Suay, Oficisto, Menacho, 80, Badajoz.
64. » Pedro Naranjo Terán, Komercisto, Zaragoza, 13, Jerez (Cádiz).
65. » Juan Cánovas Sánchez, Instruisto, Falcóns, 11, 2.º, Valencia.
66. » Federico Samper, Komercisto, Pí y Margall, 13, Valencia.
67. F-ino. Josefina Samper, Studentino, Pí y Margall, 13, Valencia.
68. S-ro. Ismael Macián, Capelista, Cruz Nueva, 12, Valencia.
69. » Julio Belenguer Nuez, Financaoficisto, Abadía, 16, Teruel.
70. » Pedro Nolasco Calvet, Urbaoficisto, plaza Cajeros, 62, Valencia.
71. » Roberto Calvet, Bankoficisto, plaza Cajeros, 62, Valencia.
72. » Rafael Vizcaíno, Bancoficisto, Gran Vía Marqués del Turia, 16, 2.º, Valencia.
73. S-ro. Rafael Caplliure Ballester, Desegnisto, Ribera, 25, 2.º, Valencia.
74. S-ro. Won Kenn, Institut Franco-Chinois, Fort St. Irénée, Lyon (Francia).
75. F-ino. Josefina Cucó, Oficistino, Unión Ferroviaria, 38, 3.º, Valencia.
76. » Dolores Cucó, Unión Ferroviaria, 38, 3.º, Valencia.
77. S-ro. Aurelio Yanguas Fleury, Prokuroro, Gran Vía Cervantes, Y, Valencia.
78. S-ro. Luis García Guijarro, Kongresa Deputato, Caballeros, 24, Valencia.
79. S-ro. Manuel Oliag Oliag, Bienulo, Pintor López, 5, Valencia.
80. » Rafael Duyos Sedó, Leut. Kolonelo, Avenida del Conde de Peñalver, 22, Madrid.
81. S-ro. Francisco Máñez Sánchez, Terkulturisto, San Francisco, Ches-te (Valencia).
82. S-ro. Juan Francisco Serra Ferrando, Kuracisto, Libertad, 20, Liria (Valencia).
83. S-ro. Juan Barceló Andréu, Militisto, Cuartel de Infantería, Palma (Baleares).
84. S-no. Dolores Batllés Gómez, plaza Carlos Castel, 3, pral., Teruel.
85. S-ro. Julio Torres Ortiz, Urba Oficisto, Zaragoza, 1, Valencia.



86. S-ro. Juan Gilí Norta, Komercisto, Cornet y Mas, 43, 3.º, Barcelona (Sarriá).
87. S-ro. Manuel Sánchez de Armas, Profesor de idioma, Juristas, 5, 3.º, Valencia.
88. S-ro. Rafael Estopiñán Robres, Komercisto, Ramilletes, 6 y 8, Valencia.
89. S-ro. Manuel Iserte, Komercisto, Ramilletes, 10, Valencia.
90. » Francisco Martínez Ibor, Komercisto, Bolsería, 21, bajo, Valencia.
91. S-ro. Vicente Tro Ferrer, Komercisto, Bolsería, 24, Valencia.
92. » Francisco Sánchez Roglá, Komercisto, Liñán, 1, Valencia.
93. » Miguel Eced Oñate, Licea Profesor, P. Carlos Castel, 23, Teruel.
94. Doktoro Francisco Moll Vives, Pastro, Roterós, 9, Valencia.
95. S-ro. José Ochoaño Nadal, Pastro, Colegio de Vocaciones, Valencia.
96. » José Santo, Pastro, Colegio de Vocaciones, Valencia.
97. » Jaime Grau Casas, Gazetisto, Clarís, 72, Barcelona.
98. » Carlos Peig Calvet, Komizo, Puigcerdá, 22, Sabadell.
99. » Joaquín Barba Aymat, Mehanisto, Escoles Pies, 97, Sabadell.
100. » Juan Comadrán, Tipografo, Casanovas, 21, Sabadell.
101. » Juan Vilardell, Industriísto, Poniente, 11, Sabadell.
102. » José Pinell Mas, Komercisto, Gurrea, 23, Sabadell.
103. » Eduardo Mallent, Komercisto, Pascual y Genís, Valencia.
104. » Aurelio Mallent, Komercisto, Pascual y Genís, Valencia.
105. » Romualdo Aguilar Blanch, Kuracisto, Pasaje Monistrol, 2, Valencia.
106. S-ro. Gregorio García Bachiller, Komercisto, San Vicente, 6, Valencia.
107. S-ro. Román Borrás Agustín, Komizo, Guillem de Castro, 7, 3.º, Valencia.
108. Pastro Narciso Fuentes, S. J., Colegio de San José, Valencia.
109. Pastro Darío Hernández, S. J., Calle Cadirers, Valencia.
110. Pastro Guillermo Hijarrubia, Universidad Pontificia, Valencia.
111. Pastro Jesús de Orihuela, F. C., Monajejo, Calle de Cirilo Amorós, Valencia.
112. S-ro. Antonio Martínez Zanón, Profesor, Calle de Gil Polo, Valencia.
113. S-ro. Juan Tormo Artés, Advokato, Calle Conde de Montornés, 7, Valencia.

114. S-ro. Luis Millás Sagreras, Inženiero, Calle de Cuarte, 25, Valencia.
115. S-ro. Angel Peña Muñoz, Farmacia komizo, San Bult, 3, 3.º, Valencia.
116. Doktoro Pedro Tamarit Olmos, Medicina profesoro, Wilson, 3, Valencia.
117. S-ro. Ramón Soler Miracle, Pentristo, Montanya, 92, Barcelona.
118. Doktoro Miguel Martí Pastor, Medicina Profesoro, Recaredo, 12, Valencia.
119. Isidoro Díaz, Komercisto, Tocina (Sevilla).
120. Eduardo Conceição, Polico, Imprensa Nacional, 19, Lisboa.
121. José Ruiz Tarín, Terkulturisto, Calle de Valencia, Cheste.
122. Miguel Botella Donderis, Komizo, San Vicente, 141, Valencia.
123. Jorge Saldanha Carreira, Komercisto, A. Duque de Loulé, Lisboa.
124. Antonio Costa, Ĵurnalisto, rua do Carriao, Lisboa.
125. Francisco Albiñana Martín, Licea direktoro, Albacete.
126. Victor O. de Allende, Vojinženiero, Provinca Deputataro, Bilbao.
127. Miguel Camallonga Valor, Komercisto, P. Músico Gomis, 1, Valencia.
128. P-tro. José Miravalls Canalda, Arzobispo Mayoral, 3, 1.º, Valencia.
129. S-ino. Concepción Duart Monfort, P. Calatrava, 4, 3.º, Valencia.
130. P-tro. Ramón Monfort, Calle del Ave María, 3, Valencia.
131. S-ro. Félix Díez, Profesoro, Komerca Universitato, Deusto, Bilbao.
132. » Rómulo S. Rocamora, Advokato, Gran-Vía Layetana, 13, Barcelona.
133. » Francisco Piñol Magrané, Ornampentristo, Amalia, 16, 2.º, 2.ª, Barcelona.
134. Antonio Durá Martínez, Ŝuisto, Carretas, 41, 2.º, 1.ª, Barcelona.
135. F-ino Carmen Martínez Torrella, Samaniego, 16, Valencia.

